Universala Esperanto-Asocio

EKSTERAJ RILATOJ

Estrara Subteamo: MOVADO

LA cirk 2014-09-05 Tria Aĝo  (EKO 2014-43) sendita el Novy Sącz.

# Forumo de la Tria Aĝo

La sekva teksto iris al limigita publiko – la estraroj kaj observantoj de UEA kaj ILEI plus kelkaj unuopuloj. Tial la nekutime persona stilo. Pli objektiva resumo pri la aranĝo aperis en EKO 44.

Karaj,

Tio okazis hodiau matene en Novy Sącz (sud-orienta Pollando), kiel ligita aranĝo al la Ekonomia Forumo, kiu venis hieraŭ al fino. Mi ne raportos al la tuta mondo pri tio, sed sukcesis nia interveno. La salono estis tute plena, pliaj aŭskultis de apuda salono, pli ol cent. Estis jam trihora kunsido, kaj nia paneldiskuto okazis en la lasta parto - kun sep panelistoj, membrino de la pola parlamento sidis sur la podio apud mi. La tuto (krom mi) okazis en la pola lingvo.

Mi sukcesis havi ĉ. sep minutojn por interveni, parolante en Esperanto kun sinsekva tradukado de Jolanta Kieres. La aŭdo de fremda lingvo tuj kaptis atenton. Mi skizis tri ĉefajn argumentojn: la lernfaciligan, la kulturajn (propra kulturo + ponto inter kulturoj). La tria argumento rilatis specife al homoj de la tria aĝo: mia frazo "Esperanto estas lingvo, kiun oni povas eklerni ekde ajna aĝo" renkontis spontanan aplaŭdon kaj ŝtormon da intervenoj (pli ol ajna alia panelisto). Jolanta konfirmis, ke la plimulto de la intervenoj estis pozitivaj (kiel same en interparoletoj ekstere poste). Tiom la publiko aktiviĝis, necesis eĉ rezigni pri mia konkluda frazo "Unike al Esperanto, homo en tria aĝo povas atingi saman nivelon, kiel denaska parolanto, kio apenaŭ iam validas por aliaj lingvoj."



Tiujn frazojn mi sukcesis tamen diri en televida intervjuo kun Krakova televido, same kun sinsekva tradukado. Ili filmis pli ol kvin minutojn da materialo, aldone Jolanta povis plion aldoni en la pola. Kiom el tio travivos la preparan redaktadon, ne eblas diveni.

Vortoj: 260

Teksto aldonita al vikio Apr 28, 2015.
PDF postfarita 12 nov 2015.

Foto:
Vespera tostado pro la sukceso de la tago.